




Boletín

Nº 436 Octubre - Diciembre 2021



Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 436

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.
Revizio: J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es
angelarquillos@gmail.com

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la
respektivaj aŭtoroj
* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn
*Republikado de enhavo nur permesita kun per-
meso de la redakcio aŭ de la aŭtoro
Financaj aferoj: financoj@esperanto.es
Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7
ES-28015 Madrid
admin@esperanto.es
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961
TRIADOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025
Poŝtelefono: +34 638 547 104
Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

| | Estraro |
|-----------------------|--------------------------|
| Prezidanto: | Ángel Arquillos López |
| Vicprezidanto: | Alberto Granados Orcero |
| Sekretario: | Manuel Parra |
| Vicsekretario | Isidoro Ortega López |
| Kasisto. | Jesús M. García Iturrioz |
| Voĉdonantoj: | Vicente Manzano (Viko) |
| “ | Ana Manero |

Prezidanto HEJS
kaj voĉdonanto: William Guerrero

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

SALUTVORTOJ

Feliĉan Novan Jaron 2022 al ĉiuj le-
gantoj, malgraŭ la malbona situacio
pro la nelacigebla viruso, kiu surprizas
nin de tempo al tempo, tamen ni
daŭrigas nian laboron kun prudento,
kaj kun la sama ideo disvastigi la in-
ternacian lingvon, ĉar tiel estas nia tas-
ko kaj restas multe da laboro en Espe-
rantujo.

Post tri monatoj pli malpli, ni planas
okazigi nian nacian kongreson en la
bela urbeto Comillas kaj mi imagas ke
multaj el vi jam pretigas la bagaĝon,
ĉar la horizonto ĉi-foje, danke al
scienco, bonaspektas kaj la vakcino
kuraĝigas nin, ĉar estas pruvite ke ĉio
“enordas”, sed kiel ĉiam kun prudento.

Danke al pluraj kontribuantoj, la bul-
teno plenplenas je interesaj kaj allogaj
raportoj, artikoloj ktp, ĉar ĉio kio rilat-
as al nia lingvo estas interesa, sed
ankaŭ estas amuze legi spritaĵojn, ra-
portojn pri spertoj, pro tio mi daŭre
petas al vi sendi tiun artikolon, kiun vi
verkis kaj kaŝas en tirkesto pro mi ne
scias la kialon.

Mi esperas kaj deziras ke vi ĉiuj ĝuos
la legadon, ĉar kiel dirite, la bulteno
informas pri la Movado, sed ankaŭ
amuzigas per interesaj tekstoj. Koran
dankon.

La redaktoro
Ángel Arquillos

ENHAVO

| | |
|--|----|
| Salutvortoj | 1 |
| Fundación Esperanto | 3 |
| Aliĝilo 80a Kongreso de Esperanto | 4 |
| 80a Hispana Kongreso de Esperanto | 5 |
| Scienca kalendaro en Esperanto | 7 |
| Pri grupoj kaj Asocioj | 8 |
| Forpasoj | 11 |
| Prezentado de libro pri Teruel | 12 |
| Eŭropo Unio antaŭ Kovim-19 | 14 |
| Pri bieroj kaj Bitoteko | 16 |
| Bitoteko kaj Hispana | 17 |
| Trajnoj tra la Pirineoj | 18 |
| Korespondpeto | 20 |
| La poeto de la Respubliko | 21 |
| Kotizoj pri revuoj de Esperanto | 25 |
| La stranga angulo, ĉapitro 3a | 26 |
| El Esperanto es útil: una experiencia personal | 28 |
| Iom da matematiko (5) | 31 |

LA ZAMENHOF-TAGO EN LA RADIO

La 15an de decembro mem, tuj post ĝia komenco, la Tago de Esperanto eĥis en radiostacio Radio Nacional de España. Konkrete, la programo “Gente Despierta” interparolis kun la direktoro de Fondumo Esperanto, José Antonio del Barrio.

Vi povas aŭskulti la programon en la adreso <https://rtve.es/play/audios/gente-despierta/segunda-hora-15-12-2021/6247438/> (ekde min. 7) kaj en la Bitoteko de HEF ĉe <https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/6679>



FUNDACIÓN ESPERANTO

INFORMADO PRI 2021

La helpoj programitaj por 2021 estis anoncataj kaj publikigataj en n-ro 432 de "Boletín" (okt-dec.2020) de HEF.

Kutime, ni disponas je modesta kvanto por helpoj. Tamen, danke al malavara donaco de bonfarulo ni disponis je pli da mono ol kutime. Ni aprobis la jenajn mon-helpojn:

- Hispana Esperanto-Federacio: 1.100 €. Pro publikigo de libroj ("Omaĝe al Lorca", "Cigana romancaro" kaj lernolibroj) kiuj krome estis disdonitaj al E-grupoj).

- Grupo "Liberanimo" de Teruelo: 400 € pro publikigo de la libro "Esperanto kaj esperantistoj en Teruel".

Malsame ol kutime, en nia sidejo en Zaragozo pro la pandem(on)iaj cirkonstancoj, ne estis organizataj ĉeestaj E-kursoj.

PROJEKTOJ POR 2022

Helpoj por instruado kaj disvastigado de Esperanto.

Oni helpos diversajn aktivaĵojn por Esperanto.

Ekz.: organizado de E-kursoj, eldono de libroj en aŭ pri Esperanto, realigo de E-eventoj...

Eĉ oni povas fari aliajn sugestojn aŭ proponojn.

La petoj devos esti ricevataj antaŭ ol la 30a de novembro de 2022.

Kutime, ni helpas prefere al E-grupoj kaj pro aktivaĵoj jam faritaj.

Principe, la tuta kvanto disponebla por helpoj estos 1.000 €.

Krome, menciindas, ke ni esperas vidi la publikigon de la libro de Miguel Delibes "Sinjorinjo en ruĝo sur griza fono" kies traduko al Esperanto estis farata senpage danke al bonvolemo de Antonio Valén.

Lorenzo Noguero
(Prezidanto de "Fundación Esperanto")



80a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO

Comillas (Kantabrio)

29a de aprilo — 3a de majo 2022

ALIĜILO

Plenigu ĉi aliĝilon, kaj sendu ĝin al la sidejo de KantEA (San Fernando 58, P-8; 39010 Santander). Ankaŭ eblas uzi la adreson kongreso@esperanto.es, aŭ la retejan formularon: <http://www.esperanto.es/kongreso/>

PERSONA NOMO FAMILIA(J) NOMO(J)

ADRESO

URBO..... (.....)

RETADRESO TELEFONNUMERO(J)

MEMBRO DE HEF: Jes Ne NASKIĜDATO (nedevice, nur por statistiko aŭ rabato)

DATO DE PAGO⁽¹⁾ MANIERO DE PAGO

KATEGORIO.....

KOTIZO + DONACO = SUMO

KOTIZOJ

| KATEGORIOJ | ĝis la 31a de januaro 2022 ⁽¹⁾ | Post la 1a de februaro 2022 kaj surloka aliĝo |
|--|---|--|
| Membro de HEF aŭ KantEA | 57€ | 62€ |
| Ne membro de HEF aŭ KantEA | 67€ | 72€ |
| Juna membro de HEF/KantEA (sub 30) ⁽²⁾ | 47€ | 52€ |
| Junulo ne membro de HEF/KantEA (sub 30) ⁽²⁾ | 52€ | 57€ |

La aliĝo estas senpaga por nepraj akompanantoj de handikapuloj kaj naskiĝintoj post 31-12-1999.
Se vi volas partopreni la kongreson, sed vi havas ian malfacilaĵon, bonvolu kontakti la organizantojn.

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.

(2) Sama rabato estas aplikebla kaj al akompananta familiano kaj al lernantoj de Esperanto, ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aliĝitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2019 kaj oktobro 2021

Bonvolu pagi la kotizon jene: per Paypal (79ahispanaesperantokongreso@gmail.com) (como PAGO a un AMIGO / NEPRE kiel PAGO al AMIKO); per banko, nepre indikante la tekston "Kongreso" kaj vian nomon, en la bankokonto de "Asociación Cántabra de Esperanto": Caja Rural de Burgos: ES06 3060 0071 8421 3512 2212 /BIC: BCOEESMM060; aŭ per nia konto ĉe UEA: kodo (asce-h).

ALIAJ INFORMOJ

Pretas partopreni en la programo: (aparte menciu proponon)

Pretas partopreni en la spektaklo "VIVU LA TEATRO!" : Jes Ne

Noto pri personaj informoj: via nomo kaj devenloko aperos en reta listo de aliĝintoj kaj en kongreslibro; vi rajtas sugesti la manieron sub kiu ĝi aperu. via retadreso aperos en listo disdonebla al aliaj kongresanoj, sed vi rajtas peti ke ĝi ne aperu. ceteraj informoj estos utiligataj nur por internaj celoj.

80a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

La 31an de januaro de 2021, la Loka Kongresa Komitato, kune kun la Prezidanto de KantEA decidis proponi al Hispana Esperanto-Federacio la okazigon de la 80a Hispana Kongreso de Esperanto en 2022, en Comillas, en la sama kongresejo kaj en la samaj datoj, en kiuj ĝi estus devinta okazi en 2020. Kompreneble, ĉi propono postulis la okazigon de la jam programita 79a Kongreso en alia loko aŭ en alia formo. Tio ja okazis, kaj HEF okazigis la unuan bit-kongreson en sia tuta historio.

Tiel, post la necesa interkonsento inter la HEF-estraro kaj la kantabra LKK, kaj la nepraj demarŝoj ĉe la loka urbestro de Comillas, oni anoncis ke la 80a Hispana Esperanto-Kongreso okazos en tiu kantabra vilaĝo, de la 29a de aprilo ĝis la 3a de majo, en la jaro 2022.

La LKK provis konservi la tutan kongresan strukturon jam ekzistantan, kiel bazon por la kongreso okazonta en 2022, fakte eĉ kun bonaj perspektivoj de pliblonigo, sed la afero montriĝis malfacila pro la ŝanĝigemaj kondiĉoj postulantaj de la pandemia evoluo. Kiel ni ĉiuj jam scias, kio eblis iun tagon, tio estis absolute nebla post kelkaj tagoj. Jen kial la definitiva programo sendube havos plurajn ŝanĝojn, kiujn la Loka Kongresa Komitato ankoraŭ ne povas konfirmi.

La LKK, tamen, volas profiti la okazon por lanĉo de kelkaj gravaj petoj al aliĝintoj. Atendu do ke gravas ke ĉiu aliĝinto, kaj aliĝonto, daŭre konsultu la retpaĝon de la kongreso por teni sin bone informita pri la evoluo de la kongresa aranĝo:

<http://www.esperanto.es/kantea/eo/>

Alia grava afero estas la nepra konfirmo pri partopreno en la elektitaj ekskursoj, kion la aliĝintoj al tiuj programeroj devas fari kiel eble plej frue:

La 1a ekskurso, vizito al la mirinda groto “El Soplao”, okazonta la 29an de aprilo, kaj la 2a, tuttaga ekskurso okazonta la 3an de majo, en kiu oni alvenos per ŝipo en la ĉefurbon, Santander, kaj poste vizitos la tipe kantabran vilaĝeton Santillana del Mar. Rilate al la loĝado, oni memoru ke ĉiu aliĝinto devas mem zorgi pri sia loĝado. Por faciligo de la laboro, la Loka Kongresa Komitato aranĝis liston de kontakteblaj hoteloj, pensionoj kaj lueblaj loĝejoj, kiun oni povas konsulti en la retpaĝo de la kongreso. Oni ne atendu ĝis la lasta horo se vi volas ricevi ne multekostan loĝejon.

La homoj, kiuj alvenos en Comillas la unuan kongrestagon, devas bone memori ke ili povos ĝui la aranĝon nomatan “Frata Komuna Vespermanĝo”, kiu konsistos el manĝaĵoj alportitaj de la kongresanoj el siaj respektivaj devenlokoj. Ĉu ni havos surprizojn rilate al la proponitaj manĝaĵoj, tio dependos de ĉiu kongresano. Ni suspektas ke ne mankos la famaj anĉovoj el Santoña (Kantabrio), kaj vi, kara kongresanto, kion vi planas?

Je dispono de la kongresanoj estos diversaj kuponoj por rabatita akiro de esperantaj verkoj kaj, krome, oni prezentos novajn librojn en Esperanto, inter ili: “Esperanto kaj esperantistoj en Teruel”, dulingva verko de Serafín Aldecoa, kaj “Ĉiuj steloj etas nokte”, kolekto el mikronoveloj partoprenintaj en la Belartaj Konkursoj de UEA.



Laŭlonge de la tuta kongreso en Comillas, eblos spekti, en aparta salono, diversajn filmojn kaj filmetojn, tiel ke ĉiu kongresano povos esti en kontakto kun la lingvo la tutan tempon.

Pri la programo eblas diri ke, laŭ tio, kion ni konas nun, estos pluraj ŝanĝoj en la listo de prelegantoj, al kiu aliĝos, inter aliaj, Vicente Manzano kun tre alloga propono, Ana Manero, Rafael Blanco, Liven

Dek kaj aliaj certe interesaj prelegantoj.

Fine, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj aperantaj laŭlonge de du jaroj da pandemio, unu afero montras sin esperiga: la nombro da partoprenantoj daŭre kreskas.

Konsisto de la nova LKK de la 80a Hispana Esperanto-Kongreso

Prezidanto Miguel Gutiérrez Adúriz

Sekretario: Pedro Ullate López

Kasistino: Guadalupe Barcina Amézaga

Rilatoj kun institucioj: Carlos Cordero Huecas

Membro: Rafael Moncalián García

Membro: Rosa Santiago Mancebo

Membro: María Carmen Blanco Peña

SCIENCA KALENDARO EN ESPERANTO

La Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC) eldonas ĉiujare sciencon lernejan kalendaron, kiu enhavas datrevenojn ligitajn al scienco kaj teknologio, kun belaj ilustraĵoj. Ni havas grandan novaĵon: en la jaro 2022 ĝi havos version en Esperanto!

La kalendaron akompanas Didaktika Gvidilo, por ke instruistoj povu ĝin utiligi en lernejoj, kaj ĝi havas version ankaŭ en la socia reto Tŭitero, kie ĉiutage oni diskonigas la koncernan datrevenon.

La kalendaro ekzistas en versioj en la hispana, galega, astura, kataluna, aragona, eŭska kaj angla lingvoj kaj de tiu ĉi jaro ankaŭ Esperanto, la franca kaj la araba. Pri la esperanta tradukado zorgis teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio, kiu konsistis el Manolo Parra, Ana Manero, Jesús García Iturrioz, Vicente Manzano kaj Toño del Barrio, kiu kunordigis la laboron, kun aldona ekstera reviziado de Orlando Raola por la kalendaro kaj Mireille Grosjean por la didaktika gvidilo.

La kalendaron oni povas trovi en la adreso: <https://digital.csic.es/handle/10261/256432> kaj en la HEF-a Bitoteko.

La oficialan prezentadon oni faris la 11an de januaro, sed la materialo en Esperanto jam ekaperis de la komenco en la tŭitera konto de la iniciato: <https://twitter.com/CalCientifico>, kaj ankaŭ en la propra konto: <https://twitter.com/SciKalendaro>.

Vi povas ĝin elŝuti, printi aŭ alimaniere ĝui. Kaj se vi rilatas al lerneja institucio, ne hezitu ĝin utiligi



PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

Sevilo

En Sevilo la Zamenhofan Tagon ni kunfestis la saman 15-an per tagmanĝo ĉe restoracio Mesón Campeones, en kvartalo Nervión. Ĝi situas apud la stadiono de Sevilla Fútbol Club (spite kelkaj el ni, Betis-uloj, hi, hi).

Kun bona etoso kaj bongusta manĝo ni pasigis agrablan babiladon.

Kiel kutime, nia vicprezidantino regalis nin per memoraĵo, (vidu la foton).

Noto:

jen de livo, fone, dekstren kaj suben:

Antonio. Luis, Paco, Nonoro, David, Lola kaj Pepe.

Antonio R.Gash



Madrido

Fuenlabrada

Kvar tagojn antaŭ la oficiala Zamenhofa Tago, madridanoj celebris la naskiĝtagon de la iniciatinto. Dekses homoj kunvenis ekde la 11a horo en la bela sidejo de la Fuenlabrada Esperanto-ligo, kie oni disponigis por nia evento grandegan salonon. Bonvenigis nin la prezidanto de Madruda E-Liceo, Félix M. Jiménez Lobo. Poste la HEF-estrarano Ana Manero prezentis la du eldonaĵojn freŝe aperigitajn de HEF kadre de la projekto “Lorca”. Sekve ni spektis interesan prelegon pri la tomboj en antikva Egiptio, kun lumbildoj kaj filmetoj, fare de Pedro Hernández. Post komuna manĝo en apuda restoracio kaj bela promeneto en la urbo, Juan del Castillo prezentis lumbildan ludon, en kiu ni devis solvi enigman murdon.

Manuel Parra



Vizito de lingva eminentulo




José Roberto Arze estas la direktoro de la Bolivia Akademio de la Lingvo (*Academia Boliviana de la Lengua*). La 10an de decembro 2021 li troviĝis en Madrido okaze de oficiala kunveno, kaj renkontis lin la HEF-anoj Pedro Sanz kaj Manuel Parra.

Arze lernis Esperanton en 1974. De tiam li strebis organizi la tutlandan E-movadon, dum kelkaj jaroj eldonis revuon kaj instruadis. En 2004 li publikigis la libron *Malgranda Bolivia Antologio*, dulingva kaj 395-paĝa. Ekzempleron li donacas por la biblioteko de HEF.

Dum la babilado li rakontas, ke la kunveno de akademi-direktoroj estis streĉa kaj laciga; aperis malakordoj, sed ne gravaj. Ni ankaŭ demandas pri la situacio de la pandemio en lia lando. Li rakontas, ke nun ĝi estas sufiĉe kontrolita. Kiel kurioza diferenco, en Bolivio estas ofte uzata la medikamento kloro dioksido, kiu ĉe ni estas malpermesita.

Manuel Parra

HEF-Bulteno 436



Zamenhof-Tago

Valencio



Ĉi jare la Grupo de Esperanto de Valencio povis rekomenci sian celebradon de la ZT, kaj kiel en jaroj antaŭ la pandemio, ili festis en la ŝatata restoracio Carmen.

La tagmanĝo okazis la 18an de decembro, unu tago post la esperante sukcesa ekspozicio fulmokursoj kaj prelegoj en la EScuela Oficial de Idiomas de Valencio. En la foto komencante maldekstre:

Raúl, Ana, Carmen Aranza, Fari kaj Rosa. La genuoj apartenas al Dennis, kaj ĉe la fino alvenis ankaŭ Luis.

FORPASOJ



Emilio Pérez Gimeno, elstara veterano de Frateco, forpasis je la fino de la jaro. Li partoprenis en la lokaj aktivaĵoj kaj aparte ŝatis veturi al kastelo en Gresiljono kune kun edzino kaj filoj. Li estis patrono de Fundación Esperanto.

Ripozu pace tiu bonkora homo.

Li aperas maldekstre, dum inaŭguro de E-monumento en 2008.

Jaime Benito Cedo forpasis 87-jara la 19an dec. 2021 en Zaragozo.

Jen la nekrologa noto kiun publikigis la familio eĉ kun vortoj en Esperanto:

Li estis de antaŭ multe entuziasma esperantisto.

Li estis prezidanto de la Organiza Komitato de la Hispana Kongreso okazinta en Zaragozo en 1983.

EL SEÑOR
Don Jaime Benito Cedo
Viudo de doña María Visitación Po
Que falleció en Zaragoza el día 19 de diciembre de 2021, a los 87 años de edad

Tristes por tu partida, felices por haberte tenido tantos años. Gracias infinitas por todo lo que hemos aprendido a tu lado. ¡Te queremos! ¡Buen viaje!
Ni amas vin! Bonan vojaĝon!

María, Susana, Santiago, Silvia, Daniel, Irene, David, Julia, Emma, Rajku, Manu, Suman, Uma, Paco, Franck y Katya.

Nos podéis acompañar en la sala 1 del Tanatorio Centro de Zaragoza, el martes, día 21, de 17:30 a 20:30 horas, y el miércoles, día 22, de 10:30 a 13:00 horas.

Funespaña - Tanatorio Centro, Camino de las Torres 75. 976 272711

Li desegnis multajn kovrilojn de la libroj de Antonio Marco Botella.

En 2008, okaze de la 100-jariĝo de Frateco, li impulsis dezajnis kaj pretigis monumenton al Esperanto.

En la lastaj jaroj, li estis patrono de Fundación Esperanto.

Ni memoru lin kun la rideto kiun kutimis montri sur la vizaĝo:



MONTSERRAT FRANQUESA



La 18-an de oktobro 2021 forpasis Montserrat Franquesa i Gòdia. Elstara esperantisto, filino de Josep Franquesa, ŝi estis estrarano de Kataluna Esperanto-Asocio kaj ĉefredaktoro de la revuo *Kataluna Esperantisto*, la oficiala organo de tiu asocio.

Magistro pri klasika kaj ĝermana filologioj, kaj ankaŭ doktoro pri tradukado en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono, Montserrat Franquesa estis fondinto de la Kataluna Societo de Novhelenistoj, kaj prezidanto de la Asocio de Instruistoj de la germana en Katalunio. Ŝi ankaŭ estis redaktoro de *Visat*, la cifereca revuo de kataluna PEN-klubo. Ŝi ĵus revigligis la revuon de Kataluna Esperanto-

Asocio en ĝia sesa periodo, tasko kiun ŝi plenumis per la aperigo de la lasta numero, tre festata inter la kataluna kaj internacia esperantistaro.

Kataluna Esperanto-Asocio organizis omaĝon al ŝi okaze de la Zamenhof-Tagon, la 18an de decembro en la Biblioteko Jaume Fuster de Barcelono. En la evento partoprenis familianoj, amikoj kaj ankaŭ kolegoj de filologiaj rondoj. Koncertis la muzikgrupo *Kaj Tiel Plu* kaj estis prezentata, premiere, la vintra numero de Kataluna Esperantisto, ŝia lasta kontribuaĵo al Esperanto.


La omaĝo estas spektebla en la reto en la adreso https://www.youtube.com/watch?v=wtBu1w_I1S0.

(laŭ informoj de Kataluna Esperanto-Asocio)

HEF-Bulteno 436

PREZENTADO DE LA LIBRO “ESPERANTO KAJ ESPERANTISTOJ DE TERUEL”

La asocio de Teruel Libermanimo aperigis la dulingvan eldonon de la libro "Esperanto kaj esperantistoj de Teruel" pri la historio de Esperanto en la provinco Teruel el la fondo de la unua grupo "Santa María", kreita en 1903 en Albarracín, ĝis la nuntempaj agadoj



La aŭtoro de la libro estas la teruela historiisto Serafín Aldecoa. Aldecoa jam esploris la biografiojn de Julio Belenguer, Francisco Azorín, Ricardo Mallén... kaj nun li kompletigis sian laboron farante ampleksajn esplorojn per gazetarkivoj, inkluzive de fontoj kiel "La Suno Hispana" kaj "Hispana Jarlibro". Aldecoa insistas, ke ĉi tiu libro ne povis esti titolita "Historio de Esperanto en Teruelo" ĉar estas multe da historio por malkovri en la arkivoj kaj ankaŭ ĉar Esperanto vivas en Teruelo kaj ĝia historio ĵus komenciĝis.

La Esperanta traduko estas verko de Alejandro Pareja

"Esperanto kaj Esperantistoj de Teruel" konsistas el 7 ĉapitroj, en kiuj la aŭtoro analizas la aperon de la grupo "Santa María" en Albarracín, la postan kreadon de la grupo en Teruel ĉefurbo, la eks-

pansion de Esperanto tra la vilaĝoj de la provinco, la grupo de Alcañiz, la individuaj figuroj, esperantistaj virinoj kaj, fine, la nuna situacio de Esperanto en Teruel, kun la fondado de Libermanimo en 2016.

Esperanto venis al Albarracín per la religia ordeno de la Piaristoj. La grupo "Santa María" fondiĝis en 1903 kaj, de ĝi, okazis granda ekspansio de la lingvo en la tuta provinco en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento. Se la unua ekspansio estis laboro de la piaristoj, la grupoj kiuj formiĝis poste estis pli ligitaj al liberalaj profesiuloj (advokatoj, funkciuloj, instruistoj...) La kresko de la nombro de esperantistoj en la provinco estis rapida. Elstaris la kreado de la ĉefurbo Teruela grupo, fare de la nelacigebla Julio Belenguer, kaj de la grupo "Polusa Stelo" de Alcañiz. La aŭtoro recenzas la verkon de Belenguer, kaj aliaj elstaraj esperantistoj kiel Francisco Azorín, Serafín Villarroya, Miguel Sancho Izquierdo, Ricardo Mallén, Sara Maynar...



Se la ekspansio de Esperanto en Teruel estis rapida, ĝia malrapido ne malpligrandigis post la frankisma puĉo. Esperantistoj kiuj ne estis ekzekutitaj (kiel Serafín Villarroya), ekzilitaj (kiel Francisco Azorín) aŭ reprezaliitaj (kiel Ricardo Mallén), devis akomodi sin al la diktatora reĝimo aŭ vivi en "interna ekzilo".

Post la milito ne plu estis organizita Esperanto-agado en Teruel ĝis la kreo de Libermanimo.

La prezento de la libro okazis en du fazoj. Unue, kadre de la Teruela Modernisma Semajno, oni faris prezentadon en la Teruela Kazino, kadre de malgranda ekspozicio pri antikvaj esperantaj libroj kaj objektoj. Poste la libro estis prezentita ankaŭ en la Provinca Muzeo de Teruelo


La eldonaĵo estas subvenciita de la Departemento pri Kulturo de la Registaro de Aragono kaj de la Fondaĵo Esperanto. Tial LIBERANIMO decidis disdoni ĝin senpage, pagante nur la sendokostojn. Por ricevi la libron, simple sendu retmesaĝon kun nomo kaj adreso al esperantoteruel@gmail.com



EŬROPA UNIO ANTAŬ KOVIM-19

Multaj riproĉaj voĉoj leviĝis kontraŭ la agado de Eŭropa Unio (EU) okaze de la pandemio pro kronviruso, pensante ke EU estas ĉiupova organizo rilate siajn membroŝtatojn, sed vere ne estas tiel. La 27 apartenantaj membroŝtatoj kvankam transdonis grandan parton de iliaj kompetentoj, ili gardas ankoraŭ kiel proprajn, aliajn gravajn. Tio signifas ke difinita kompetento apartenas al Unio nur kiam la originaj traktatoj (ĉefe Lisbono 2009) atribuas ĝin specife.

Do, ni devas klarigi la funkciadon de la kompetenta sistemo de la Unio, inter *ekskluzivaj, kunlaboraj, ŝtataj, kaj apogaj taskoj*. La *ekskluzivaj kompetentoj* estas tiuj per kiuj EU posedas plenan kapablon laŭ la traktato de Lisbono. Temas pri la dogana unio, interna merkato, komerca politiko, fiŝkaptaj kaj mona politikoj, protektado de la biologiaj marestaĵoj kaj la internaciaj traktatoj rilatantaj tiujn menciitajn fakojn. Per la *kunlaboraj taskoj*, la Unio kaj siaj membroj agas kune kaj ambaŭ estas titularaj de tiajn kompetentoj kaj la eblaj malkonsentoj solviĝas laŭ la principoj de akcesoreco kaj proporcieco kiam la Unio devas pravigi sian supranacian nivelon (art. 5 Traktato Lisbono). Temas pri ĉio necesa por la interna merkato, agrikultura politiko, protektado de konsumantoj, transeŭropaj reloj, energio, dungigado, sociaj aferoj, ekonomia kohero, kaj protektado de la medio. En ĉi specifaj areoj, la agado de la Unio estas limigita, ĉefe pro la principo de proporcieco, kaj EU ne povas agi pli ol necese por sukcesigi la celojn de la traktatoj. *Ŝtataj taskoj* estas: sano, edukado, industrio, defendo ktp. Fine, la *apogaj kompetentoj* estas tiuj kiuj apartenas al membroŝtatoj sed la Unio rajtas ĝin apogi. Ili estas i.a. protektado de la homa sano, kulturo, industrio, turismo, edukado, sporto, kaj junularo.



Kaj jam pri nia temo, kion povas fari EU por helpi la europanojn okaze de ĉi tiu pandemio? EU estis komence kritikata pro nerapida ago fronte al krizo de kronviroza malsano. Certe ĝi, surprizita pro la situacio de nova malsano, malfruiĝis je sia agado, samkiel okazis en la plej granda parto de ŝtatoj. Sed ni jam klarigis ke la sanitara politiko ne apartenas al la kompetentoj de la Unio, kaj nur per la principo de akcesoreco, ĝi povas serĉi plej efikan agmanieron, kiam la celoj de la serĉata tasko ne povos esti plenumita de la ŝtatoj. Tio ne okazis en la unuaj momentoj de la kronviruso, kiam ĉiu ŝtato prenis siajn proprajn agadojn. Dum la pandemio la rolo de la naciaj kaj regionajn parlamentoj estas grava ĉar la Protokolo 2 de la Traktato de Lisbono antaŭvidas ke kiam la celoj de la serĉataj taskoj ne povos esti plenumitaj de la membroŝtatoj nek regione nek loke, la institucioj de la Unio rajtas kontroli tiun plenumon.

Tamen mi mencios ke EU ekde 2005 havas “*Europa Centro por antaŭvido kaj kontrolo de infektaj malsanoj*” (ECDC) kaj ĝia funkciado konsistas el faciligo de datumoj kaj scienca konsilado pri tiuj malsanoj, kun la apogo de Eŭropa Agentejo de Medikamentoj, kaj la Eŭropa Oficejo de la Tutmonda Sanorganizo. Tiucele EU havas sistemon pri frua alarmo, ĉiam konfidenca por la membroŝtatoj, kaj je la komenco de kronviruso, EU avertis la 9-an de januaro 2020 la 27 membrojn, sed ilia reago estis malsimila.

Kaj kion faris EU ĉe la landlimoj? Ni konstatis ke dum pandemio la landlimoj ne validas. Do, la fundamentaj liberecoj de EU, nome la libera cirkulado de personoj, varoj servoj kaj kapitaloj ankaŭ estis fortranĉigitaj. Oni kreis specialan grupon pri landlimoj, por kontroli ilian eblan fermon por kontrolo. Tiel multaj subskribintoj de la t.n. Schengen Areo, uzis la permeson “kontroli la internajn landlimojn en esceptaj okazoj”. Oni konsideris ke KOVIM 19 estas tre grava kaŭzo por fermi landlimojn.

Aliaj solvoj trovataj por helpi la membrojn, estis ekonomiaj: Distribui 750.000 milionojn de eŭroj inter la 27, kompreneble kun kondiĉoj, por rekonstruado de la landoj, sed pro la fakto ke tiuj kondiĉoj ne plaĉas same al la membroj, ili ankoraŭ ne efektiviĝis plene..

En decembro 2020 komenciĝis la distribuado de la diversaj vakcinoj inter la membroŝtatoj kaj tio estas gravega afero por bremsi la pandemion, kaj en 2021 la vakcinado jam estas fakto. Tamen, komence de aprilo Tutmonda Sanorganizo atentigis EU-on pri la nesufiĉoj de vakcinoj kaj konsekvence la malmulta vakcinado. EU plendis pri la nesufiĉaj dozoj senditaj de la Farmaciaj kompanioj, kio kaŭzas veran kaoson. Ŝajnas ke tiu problema jam solviĝis kaj E.U bone funkciis denove.

Fine, ni esperantistoj revas la eblecon partopreni ĉeeste renkontiĝojn kaj kongresojn, kvankam feliĉe oni pruvis ke virtuala parto estis ege sukcesa.

M^a. Rafaela Urueña

PRI BIEROJ KAJ BITOTEKO

Antaŭ kelkaj semajnoj iu montris al mi intereson pri biero, kiu portis la nomon Zamenhof kaj estis produktita de nova entrepreno sub la marko *Cervezas Speranto* ¹. *Boletín* jam raportis siatempe pri tiu bierfarejo lokita en Toledo ².


La afero estas interesa ne nur el gustuma flanko, sed ankaŭ – kaj ĉefe por bibliotekisto – el dokumenta vidpunkto. Tial mi cerbumis pri tio, kiel konservi spurojn de io plej verŝajne baldaŭ malaperonta, kio eble estonte interesos esploristojn. Kaj mi alvenis al konkludo, ke la plej efika maniero estus konservi la komercajn etiketojn de tiuj produktoj en bita formato.

Sekve, do, mi kontaktis la entreprenon por peti permeson alŝuti la etiketojn al Bitoteko. La responsuloj volonte kunlaboris kaj sendis kvalitan dosieron de ĉiu etiketo rilata al nia lingvo. Miaflanke, mi kreis novan kolekton en Bitoteko, Efemeraĵoj, por konservi ne nur ĉi ekzemplojn de Esperanto en komerca uzado sed ankaŭ bitkopiojn de alispecaj mallongedaŭraj dokumentoj. La vorto efemera devenas el la greka (ἐφήμερα) kaj signifas “io daŭra ne pli ol unu tagon”. Kelkaj efemeraĵoj ³ havas jam sian propran sekcion en Bitoteko, kiel la afiŝoj kaj la poŝtkartoj, sed en ĉi nova kolekto trovos lokon salutkartoj, loteribilettoj, kalendaroj, poŝtmarkoj, anoncojn, kaj similaj.

Danke al biero, do, kaj ne pro la efiko de alkoholo –aŭ ne nur pro tio!–, en Bitoteko vi trovos ekde nun novan kolekton.

Je via sano!

Ana Manero



¹ <https://cervezasperanto.es/cervezas/>

² Vidu: *Boletín*, n. 407, p. 10 (<http://hdl.handle.net/11013/4467>)

³ Vidu: <http://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/6660>

BITOTEKO KAJ HISPANA


Kiam en 2012 Bitoteko aliĝis al *Hispana*, la projekto de la Ministerio pri Kulturo, kies celo estas kunigi la bitkolektojn de hispanaj arkivoj, bibliotekoj kaj museoj, la solaj kondiĉoj por rikolti niajn metadatenojn estis, ke ni havu OAI-deponejon kaj ke niaj rikordoj estu disponeblaj en oai_dc-formato¹. Alivorte do, ke niaj metadatenoj estu taŭge formitaj kaj alireblaj. Tiujn teknikajn postulojn HEF facile plenumis pere de DSpace, la sistemo, kiu funkciigas Bitotekon. Tiam, la interkonsento kun la Ministerio estis plej simpla: HEF kontaktis la Ministerion por proponi kunlaboron kaj kiam *Hispana* konstatis, ke Bitoteko ja plenumas la necesajn kondiĉojn, ĝi ekrikoltis niajn metadatenojn kaj aperigis ilin en sia retejo. Necesis nenia formalajaĵo.

Sed komence de decembro, HEF ricevis retmesaĝon de la Ministerio, per kiu oni informas la partoprenantajn instituciojn en *Hispana*, ke sekve de la renovigo de la projekto por plibonigi la servon, ekde nun necesas subskribo de partoprena interkonsento.

Tiu interkonsento celas ĉefe reguligi la liveron de metadatenoj flanke de la partoprenantaj institucioj kaj ilian uzadon, flanke de *Hispana*. Do, simila dokumento al tiu, kiun HEF devis subskribi en 2013 kun la Ministerio por partopreni en *Europeana* ².

Ricevinte la komunikon HEF, kompreneble, subskribis la partoprenan interkonsenton. Nenio ŝanĝigos en la funkciado, sed la kunlaboro estas nun oficiale dokumentita.

Ana Manero



Cigana romancaro / Federico García Lorca ; tradukis, Fernando de Diego ; [antaŭparolo de William Auld ; antaŭparolo de la dua bita eldono, Antonio Valén]

Identificadores del recurso

<https://hdl.handle.net/11013/6429>

Procedencia

(Bitoteko)

¹ OAI (Open Archives Initiative): Iniciato por Malfermaj Arkivoj. OAI-PMH (Open Archives Initiative-Protocol for Metadata Harvesting): OAI-Protokolo por Metadatena Rikolto (<https://es.wikipedia.org/wiki/OAI-PMH>)

² Vidu: Boletín, n. 399, p. 15-16. (<http://hdl.handle.net/11013/2685>)

TRAJNOJ TRA LA PIRENEOJ

Dum la 19-a jarcento la nuraj fervojaj linioj inter Hispanio kaj Francio trairis ambaŭ flankojn de la Pirenea montoĉeno. Tiel, ĉe la mediterareana flanko, fervojo komunikis la francan urbon Cerbère kun la hispana Port-Bou jam en la jaro 1878; en la atlantika flanko estis eble iri de Iruno en Hendaye-n depost la jaro 1864.

En la jaro 1865 la hispana kaj la franca registaroj kreis komitaton por pritrakti la eblojn konstrui fervojan linion trapasantan la Pirenean montaron. Oni pristudis 12 eblajn liniojn, fine, en la jaro 1904, ambaŭ registaroj aprobis la konstruon de tri fervojaj linioj: la okcidenta, la centra kaj la orienta. La centran linion finfine oni ne konstruis. Tiu orienta, iom post iom fermiĝis pro konstantaj mon-perdoj, verdire tiu fervojo neniam estis profito-dona. Pli interesa estas la fervojo konstruita en la okcidenta flanko de la montaro.

La konstruo komenciĝis en la jaro 1908, per la traborado de tunelo sub la Pirenea montaro, ĝuste apud la montpasejo Somport. Franca kaj hispanaj skipoj komencis en tiu jaro la laborojn kaj ili fine renkontiĝis en 1912, post trabori 7,875 metrojn. Post la konstruo de la tunelo, la laboroj haltiĝis pro la komenco de la unua mondmilito. Tamen, ĉe la hispana flanko la laboroj daŭriĝis pro la fakto, ke Hispanio restis neŭtrala dum tiu milito.

Inter la jaroj 1926 kaj 1927 oni elektrizis la linion kaj fine, en julio 1928, la unua trajno trapasis sub la montaro. La nova fervoja linio komunikis la hispanan urbon Canfranc kun tiu franca Pau, entute 93 kmoj. Unu el la plej belaj allogaĵoj de la nova fervoja linio estis la stacidomo en Canfranc, temis pri impona kaj belega konstruaĵo kie estis eble uzi trakoj kun malsimilaj mezuroj: 1,435 metroj por la francaj trajnoj kaj 1,668 por la hispanaj.



Tunelo de Somport, sub la Pirenea montaro

En la jaro 1936, okaze de la hispana enlanda milito, la frankismaj trupoj okupis la stacidomon, tiam oni fermis la tunelon per granda muro, por eviti eblan invadon de respublikanaj trupoj el la franca flanko. Tio daŭris ĝis la jaro 1940, kiam, invadita Francio de la germana armeo, la fervoja linio denove estis uzata ĉefe por transporti volframon de Hispanio en Germanion. Temas pri malmolega mineralo, tre uzata por la blendado de ŝipoj, tankoj, kanonoj kaj aliaj armiloj. Inverse, Germanio sendis tra tiu tunelo, kiel pagon de la provizita mineralo, pli ol 80 tunojn da oro. Germanio eĉ okupis kaj flirtis la nazian flagon ĉe la franca sektoro de la stacidomo de Canfranc.



Stacidomo en Canfranc

Feliĉe, ĉi tiu fervoja linio ankaŭ utilis kiel eskapo-pordon por multaj homoj, ĉefe judoj, kiuj fuĝis el la nazia teroro. Elstarindaj estas la heroaj agadoj de Albert Le Lay, ĉef-doganisto en la franca flanko de la tunelo, kiu riskis sian vivon por savi milojn da homoj. Li ankaŭ kunlaboris kun la franca rezistado, tiel, li ebligis la oftan pasadon tra la doganejo de kontraŭ-naziaj spionoj kaj de armiloj uzataj de la franca rezistantoj. Kiam la germana armeo retiriĝis el Francio, fine de la dua mondmilito, Hispanio fermis la tunelon ĝis la jaro 1948. La frankisma reĝimo deziris bari eblan enir-pordon, kiu povus esti uzata de kontraŭ-frankismaj gerilistoj.

Post tiu jaro la internacia fervoja trafiko inter Hispanio kaj Francio daŭriĝis. En la jaro 1970 okazis akcidento, feliĉe sen homaj viktimoj. Laŭdire, bremsoj de trajno, haltigita sur trako kun sufiĉe granda deklivo, misfunkciis. La trajno koliziis kontraŭ ponton, la trakoj tute damaĝis kaj la fervoja linio estis interrompita post la akcidento. La fervojaj servoj de Francio kaj Hispanio ne konsideris profito-donan la elspezon de multe da mono por refunkciigi la linion.

Nuntempe, ĉe la hispana landlimo, fervojoj atingas la stacidomon Canfranc, ili tie finas sian vojon. Same, sur franca teritorio, estas eble atingi Pau el la urbo Bedous. De antaŭ kelkaj jaroj, francaj kaj hispanaj regionaj aŭtoritatuloj, de unu kaj alia flanko de la landlimo, parolas pri la eblo refunkciigi la fervojan linion sur la Pirenea montaro, tiel oni mencias la jaron 2025 kiel starto-punkton por tiu nova, sed antikva, linio.



Hispana Amikaro de Fervojistoj Esperantistaj

fervojista@esperanto.ac

<https://hafe-19.webself.net>

KORESPONDPETO

Jesús Pérez Caballero
Apartado 180
02660 Caudete (Albacete)

Tel-numero por vacapo: 642022340

Se iu volas interŝanĝi lotumadon pri kultura aŭ benefika afero mi dankos.

La poeto de la Respubliko¹

Ĉu estas tro multe peti, ke oni forprenu min el forgeso?

Álvaro de Orriols ²

Antaŭ Fernando de Diego, Konstantin Gusev kaj Miguel Fernández, alia esperantisto tradukis Federico García Lorca en la internacian lingvon. Temas pri Álvaro de Orriols [katalune Àlvar d'Orriols] (Barcelono, 1894 – Bajono, 1976).

Álvaro de Orriols (1894-1976) naskiĝas en Barcelono, ene de burĝa familio el pluraj generacioj de advokatoj. Lia patro, markizo de Fedriani, estas notario kaj ano de la Real Academia de Buenas Letras de Barcelona [Reĝa Akademio pri Belartoj]; lia patra avo, deputito de la Konservativa Partio kaj bonega oratoro ³; lia patrino avo estas kuracisto de la reĝo Alfonso XII.

En la lernejo De Orriols bone lernas la francan kaj komencas verki poezion. Tiam li ankaŭ lernas ludi violonon kaj pianon. Kaj Esperanton, enamiĝante al ĝia interna ideo ⁴. Studante Belartojn en Madrido forpasas lia patrino (jam forpasis lia patro) kaj li eniras la labormerkaton. Fine li iĝas ĉefviolonisto en simfonia orkestro, kaj frekventas la madridajn kafejojn, kie la intelektuloj kutimas voĉlegi unu al la alia siajn poemojn.

Reveninte Barcelonon, li denove rilatas kun la burĝa familia etoso. Baldaŭ li ekkonscias pri socia maljusteco kaj fariĝas socialisto. Sekvante artan alvokiĝon, li aktoras en tri filmoj produktitaj de la franca societo Gaumont. Denove en Madrido, li publikigas poemojn en beletraj revuoj kaj iĝas literatura kritikisto. Li konatiĝas kun García Lorca kaj Borges, kaj amikiĝas kun la fratoj Manuel kaj Antonio Machado, kaj Rafael Alberti.

En 1919 premieras lia unua teatraĵo, *La daga*, traduko de fama kataluna verko en la hispanan. Tiun jaron li aliĝas al Partido Socialista Obrero Español [Hispana Socialista Laborista Partio]. Iom poste li eldonas sian unuan poemaron, *Nervio*. Kaj li instruas Esperanton en la kulturcentro Casa del Pueblo [Domo de la Popolo], kaj li amikiĝas kun la ĉefaj hispanaj esperantistoj, kiel Julio Mangada kaj Francisco Azorín. Dume, lia fratino María geedziĝas kun lia amiko Luis Hermida, ankaŭ esperantisto. Poste Hermida iĝos membro de la hispana parlamento kaj ĝenerala direktoro de grava asekura kompanio, nome La Unión y el Fénix.



La dudekaj jaroj estas periodo profesie sukcesa, kun multaj reprezentaĵoj de zarzueloj kaj historiaj dramoj en la ĉefaj teatroj de Madrido kaj Barcelono. Ankaŭ familie temas pri periodo feliĉa. En 1922 li edziĝas kun Manola, en 1931 naskiĝas Álvaro kaj en 1934 Mercedes. Ekde 1931 la valoroj de la nova hispana demokratio inspiras lian verkadon kaj Orriols estas konata kiel “La poeto de la Respubliko”. Post la premiero de *Rosas de sangre* [Sangaj rozoj], li estas kondukita surŝultre ĝis la centra Puerta del Sol [Pordo de la Suno], en spontanea manifestacio. En Bonaero tiu teatraĵo prezentiĝas tri fojojn tage. Similajn sukcesojn atingas liaj sekvaj verkoj, krom dum la tielnomata Nigra Jar-Duo (1934-35), kiam la reakciaj partioj eniras la hispanan registaron. Tiam neniu teatro malfermas al li siajn pordojn.

Post la militista puĉo en 1936 De Orriols proviantas la Kolumnon Mangada, nomatan laŭ la konata militisto Julio Mangada, kiun li ekkonis kiel esperantiston. Poste en Barcelono li estas literatura kunlaboranto de la Subsekretario de Propagando de la Ŝtata Ministerio. Kaj li daŭrigas sian verkadon; interalie sukcesas *España en pie* [Hispanio stare], plurcentfoje prezentata en Barcelono, Madrido, eĉ en Francio.

La 23-an de januaro 1939 De Orriols prenas kun sia familio la vojon de ekzilo. Tiun eksodon li rakontas en *La Fajroj de Pertús*, taglibro kortuŝe verkita en 1939 kaj eldonita multfoje poste 5. Ĝi inkludas 69 belegajn dezajnojn. Krom ĝia literatura valoro, bongustaj dialogoj kaj humura tuŝo, temas pri detala atesto pri la tragedio de duonmiliono da venkitoj, kiuj forlasas sian landon en cirkonstancoj ne tro malsamaj al tiuj de la nunaj sirianoj kaj rohingo: pluvo, malvarmo,



¹ Pli frua versio de tiu ĉi teksto aperis en la retejo de la esplorprojekto *Militrakonto*. Vidu <https://mondmilito.hypotheses.org/4379>

² Espejo (2015, p. 3).

³ Li kunigis siajn diskursojn en la verko *Miscelánea oratoria* (1894).

⁴ Letero de Álvaro de Orriols al Salvador Sierra, 7-an Aprilo 1961. Vidu Espejo 2015, p. 823. Ankaŭ la filino Mercedes de Orriols konfirmis en persona komunikado (29-a julio 2021), ke Álvaro de Orriols estis fervora esperantisto, konvinkita de ĝia potencialo por interkompreniĝo kaj paco. Mercedes klarigas, ke li ĉiam parolis entuziasme pri siaj samideanoj.


⁵ Unue publikigita hispane en 1995 (*Las hogueras del Pertús. Diario de la evacuación de Cataluña*; 2-a eld. 2008), ĝi eldoniĝis ankaŭ en la franca (2011, *Les feux du Perthus: Journal de l'exode espagnol*, tradukita de lia nepo, la skriptisto Didier Damestoy de Orriols) kaj en la kataluna (2014, *Les fogueres del Pertús. Diari de l'evacuació de Catalunya*, tradukita de Violeta Roca Font), sed (ankoraŭ) ne en Esperanto.

malsato, mallumo, ĉiea morto, manko de tegmento, manko de dormo, angoro kaj malespero, kiuj devigas ilin konstante reinventi danĝeran ĉiutagan vivon per neebila ekvilibro inter solidareco kaj transvivado. Finfine saviĝas tiuj havantaj pli da rimedoj, sprit-kapablon kaj bonŝancon. La “kamarada aŭtoro” rakontas kiel la faŝismaj aviadiloj bombadas la senfinajn karavanojn de ekzilitoj survoje al Francio, same kiel la proksimajn urbojn kaj ties pulvejojn, rifuĝejojn, fervojojn kaj stacidomojn. Dum pluraj tagoj la landlimo tamen estas fermita, vera kaptilo por la rifuĝintoj. Kaj liaj aventuroj multobligas. Kiam De Orriols perdas siajn ne publikigitajn verkojn, li preskaŭ memmortigas sin. Danke al sia antaŭa kunlaborado kun la Subsekretario de Propagando li sukcesas akiri diplomatan pasporton, kiu evitas lian mobilizadon por defendi la Retiriĝon. Malgraŭ tio ke li ofte mencias la socialistan sindikaton Unión General de Trabajadores (Ĝenerala Unio de Laboristoj), nedogmeme li agnoskas la kuraĝon de la batalintoj el pluraj respublikaj tendencoj, eĉ la anarkiisto Buenaventura Durruti. Kiel aliaj katalunaj ekzilitoj, li lamentas forlasi “sian Patrujon” Hispanio, sento foje ne facile komprenebla el la nuna perspektivo.

En Francio tamen la suferoj daŭras. Iam oni devas decidi ĉu iri al Perpignano aŭ al iu Argelers. Ne havante monon, ili elektas Argelers, kie ŝajne estas manĝaĵoj kaj loĝado. Baldaŭ ili malkovras, ke tie estas nur strando kaj drat-bariloj. La franca registaro ne antaŭvidis la skalon de la homa dramo. Nekredeble la verkisto kaj Manola profitas la noktan ĥaoson por fuĝi aŭtomobile kaj fine ili retrovas siajn familianojn. Tamen, lia bopatrino mortas pro elĉerpiĝo kaj lia bofrato perdas la piedojn pro frostiĝo. La familio De Orriols ekkonas la popularajn kaj gastemajn francojn, kiuj riskas siajn vivojn por helpi ilin, malgraŭ la malpermeso de la aŭtoritatoj helpi rifuĝintojn. De Orriols laboras interalie kiel instruisto en anglaj kolonioj por perditaj infanoj de la hispana milito. Post la invado de la lando, la familio transvivas la nazian okupadon kaj iom post iom akiras decajn vivkondiĉojn.

.En 1948 oni reprezentas ekzile lian teatraĵon *Romance de Madrid*, kiu kantas la heroan rezistadon de la hispana ĉefurbo. Tiam li fariĝas sekretario de la loka grupo de la hispana Socialista Partio. En tiu posteno li bonvenigas enmigrintojn kaj helpas ilin legalizi sian situacion. Plej ofte

ili estis gerilanoj. El tiuj spertoj li verkas la romanon *Campanarios. Estampas de la lucha guerrillera* 6. Per tiaj poeziecaj verkoj li celas konservi en ekzilo la teatran tradicion de la Respubliko, kiu en Hispanio estis interrompita, por povi redoni ĝin al la lando, kiam falos la frankisma reĝimo. Tial De Orriols daŭre verkas katalune kaj hispane originalajn poemojn kaj teatraĵojn, kaj tradukas hispanajn poetojn en la katalunan. Li revas optimisme pri reveno en Hispanion. Krome, li kunlaboras kun la ĵurnaloj *El Socialista Español* (Parizo) kaj *L'Espagne*



Republicaine (Tuluzo), kaj korespondas kun intelektuloj kaj politikistoj, inkluzive de esperantistoj.

Kvankam la doktoriĝa tezo de Antonio Espejo ne aparte pritraktas la esperantistecon de Álvaro de Orriols, ĝi inkludas plurajn interesajn leterojn. En ili De Orriols klarigas interalie, ke li skribas en Esperanto same bone kiel en la kataluna kaj en la hispana. La 9-an decembro 1961 la socialista ekzilito Francisco Azorín rakontas el la meksika ĉefurbo, ke li kaj liaj klubanoj faris multe da demarŝoj por ke UEA gajnu la Nobel-premion pri paco. La 10-an majo de 1962, De Orriols dankas al Azorín pro la sendo de du numeroj de *Nuntempa Bulgario*. La 10-an aŭgusto 1961 De Orriols petas al Pablo Picasso (sensukcese) ilustru siajn tradukojn de la *Cigana Romancero* de Federico García Lorca en la katalunan kaj en Esperanton. Li imagas, ke la teksto en la internacia lingvo estos ponto-versio, kiu faciligos ĝian eldonon en “ekzotaj landoj”. De la sama aŭtoro, De Orriols aperigas en 1962 la poemon *Romanco pri la luno 7, luno*; kaj en la Universala Kongreso de Esperanto 8 en 1964 en Hago oni recitas la monologon *La Amo de Don Perlimplin*. Multjara UEA-delegito en Bajono, De Orriols ankaŭ klopodas, ke Esperanto estu studata en la francaj lernejoj kiel nedeviga lingvo. Kaj li daŭre rilatas kun siaj samideanoj, interalie René Llech-Walter (1906-2007) – estrarano de UEA kaj prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto – kaj Ángel Figuerola (1913-2003) kaj Rafael Herrero (m. 1977), ambaŭ prezidantoj de Hispana Esperanto-Federacio 9. En la Belartaj Konkursoj de UEA Álvaro de Orriols premiĝas trifoje (1961, 1962 kaj 1964), ĉiam per originalaj poemoj.

Javier Alcalde

Bibliografio

Juan Azcuénaga Vierna (1981), “García Lorca en Esperanto”, *Boletín, organo de Hispana Esperanto-Federacio* 243-244, p. 4-5.

Manuel Aznar Soler kaj José-Ramón López García (red.) (2017), *Diccionario biobibliográfico de los escritores, editoriales y revistas del exilio republicano de 1939*, Sevilla, eld. Renacimiento, vol. 3, p. 468-470.

Cazarabet. *Entrevista a Diego Santos Sánchez*, redaktoro de la libro “Romance de Madrid. Campanarios” (Renacimiento) de Álvaro de Orriols. <http://www.cazarabet.com/conversacon/fichas/fichas1/romancemadrid.htm>

Cirano (1977), “Álvaro de Orriols mortis”, *Boletín, organo de Hispana Esperanto-Federacio* 220, p. 21.

Antonio Espejo (2015), *La trayectoria dramática de Álvaro de Orriols: del género chico al teatro de masas (1919-1938)*. Doktoriĝa tezo, Universitato de Valencio.

Mercedes de Orriols Colorado (2015), “Biografía de mi padre Álvaro de Orriols”, *Episkenion* 3/4, p. 187-198.

⁶*Romance de Madrid* kaj *Campanarios* publikiĝis unufoje en 2015, en eldono redaktita de Diego Santos Sánchez, eld. Renacimiento.

⁷De Orriols ne trovis eldonejon por tiuj tradukoj, malgraŭ tio ke li sukcesis akiri la eldonajn rajtojn, interkonsente kun la fratinoj de García Lorca. En 1971 Stafeto publikigis la esperantan tradukon de Fernando de Diego de tiu verko.

⁸Fernando García Lorca (1962), “Romanco pri la luno, luno”. Tradukita de Álvaro de Orriols. *Boletín, organo de Hispana Esperanto – Federacio* 135, p. 475.

⁹Tiujn detalojn klarigis Mercedes de Orriols en persona komuniko (29-a julio 2021).

KOTIZOJ POR LA JENAJ REVUOJ - JARO 2022

REVUO ESPERANTO

| | | | | | | | |
|----|----|----|-----|-----|----|--------|--------|
| MB | MA | SA | KTO | SZ | PT | MB-50% | MB-75% |
| 27 | 57 | 45 | 18 | 114 | 44 | 14 | 7 |

MB Membro Baza. MA Membro Abonanto
SA Simpla Abonanto. KTO Abonanto de Kontakto
SZ Membro Societo Zamenhoff PT Patrono de TEJO
MB 75% rabato gxis 19 jaroj, 50% por 20-25 jaragxaj

<https://uea.org/alighoj/kotiztabelo2022>

REVUO MONATO

| | | |
|-----------------|----|-------|
| SURFACE | 60 | EŬROJ |
| AERE (+3) | 63 | EŬROJ |
| RETE | 36 | EŬROJ |

<https://www.monato.be/tarifoj.php>

KIEL PAGI

Pere de la konto de la Peranto/kunlaboranto **JEN**;

TITULAR: PEDRO A. GARROTE ESCRIBANO
BANKO: BANCO SANTANDER EN VALLADOLID

(Antaŭe estis Banko Banesto)

IBAN en formato electrónico : ES56 0030 6002 7400 0090 1271

IBAN en formato papel :IBAN ES56 0030 6002 7400 0090 1271

Ne forgesu informi pri la pago
Hisperanto.uea@gmail.com

LA STRANGA ANGULO

Skribas Viko

Ĉapitro 3. Kiel maluniversaligi Esperanton

Saluton, kara leganto.

Estas granda plezuro renkonti vin ĉi tie. Jes, mi scias, mi ne vidas vin. Sed oni imagu vin. Vi estas amanto de Esperanto, protektanto kaj de la lingvo kaj de la interna ideo kaj de la komunumo; disvastiganto de la bona novaĵo pri lingvo universala. Sed tio ne veras, ĉu? Vi kaj mi scias, ke tio nur estas ŝajno, ke ni ambaŭ emas detrui kaj la lingvon kaj la internan ideon, kunlaborante kun grava parto el la komunumo.

Aliaj samrevantanoj ne bone scias, kiel atingi tian malfacilan celon. Do permesu min, kara detruanto, ke mi diskonigu la principojn de ĉi tiu arto. Ni ne havas urĝon. Paŝon post paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro. Do, ni komencu ĉi tiun utilan kurson per ok elektitaj principoj. Ne atendu pli da lecionoj. Se oni estas sur la vojo detrui, eĉ tian atendon oni ne respektu.

1. Kiam estas nova bezono vortigi iun koncepton ankoraŭ ne Esperante vortigita, prenu radikon de la angla

Vi jam scias, ke la angla ne nur estas la internacia lingvo, sed ĝi ankaŭ estas la plej taŭga lingvo por la celo vortumi ion ajn. Do prenu el ĝi ĉion, kion vi bezonos. Siavice tia konduto montros, ke Esperanto estas nuntempa estaĵo; tiom nuntempa, ke pli kaj pli ĝi ŝajnos preskaŭ derivaĵo de la vera internacia lingvo. Ankaŭ la scienco realiĝas angle. Do, angligante Esperanton, ni ŝajnos sciencistoj.

2. Se vi ne sekvas la 1-an regulon, elektu la radikon de alia lingvo sufiĉe internacia

Per la esprimo "sufiĉe internacia" komprenu, ke ĝi prefere estu la franca aŭ la germana. Se neniu el ili kontentigas vin, elektu alian lingvon, sed nepre ĝi estu eŭropa. La forta historia rilato inter la triopo de potenĉhavaj landoj (Britio, Francio, Germanio) atingis utilan lingvan rezulton, ĉar granda kvanto da radikoj estas sufiĉe similaj inter iliaj lingvoj. Pro tio oni facile rajtas apliki la principon: se iu radiko similas en la angla, la franca kaj la germana, nepre konkludu, ke tiu radiko estas internacia. Ne same faru se la koincido estas, ekzemple, inter la ĉina, la korea kaj la japana; aŭ inter la zulua, la svana kaj la venda. Ili ne estas internaciaj sed lokaj lingvoj.

3. Ne evitu la estontajn miskomprenojn de la neeŭropdevenaj esperantistoj

Ĉar vi bezonos novajn vortojn kaj prenos la radikojn de la menciitaj internaciaj lingvoj, ne okupiĝu pri la miskompreno devenata de la koincido inter via donaco al la vortaro kaj iu kunmetado. Ekzemple, por esprimi ke iu popolo iras de unu loko al alia sen fiksa restadejo, enmetu en la vortaron la vorton nomad'o; vi ne maltrankviliĝu pro la fakto, ke la plejmulto en la mondo unuavice komprenos la signifon nom'ad'o. Same faru pri kvaranten'o, ekzempler'o, membran'o, mitul'o kaj longa tiel plu.

4. Montru, ke la historio de Esperanto estas historio eŭropa

Kompreneble, rakonti la historion de Esperanto bezonas komenci la taskon per la unuaj jaroj, kiuj estis nur eŭropaj. Rapide la lingvo disvastiĝis kaj aperis kluboj, asocioj, institutoj en ĉiuj kontinentoj. Sed tion ne rakontu. Aŭ rakontu nur tion, nome informu ke, ekzemple, la kuba movado stariĝis en 1904, kaj poste ne plu menciigu Kubon sed daŭre parolu pri la rilatoj inter la francaj kaj rusaj esperantistoj.

Vi povas ŝajni respektama menciante, ke la Esperanta asocio japana aperis en 1906. Sed poste silentu pri ili, kvazaŭ ili nur okupiĝadis pri la farbado de la enaj muroj de la asociejo. Anstataŭ sindedici pri tia enuiga agado, pli bone konstruu la historion per la enaj bataloj de la germanaj esperantistoj.

5. Substreku, ke la Esperanta literaturo estas okcidenta

Ni ĉiuj scias, ke ĉie la belartoj floriĝis per la lokaj lingvoj. Sed oni akceptu, ke la plej konataj stiloj por okcidentanoj estas okcidentaj. Do en antologioj kaj kolektoj de Esperanta literaturo, klopodu nutri vian mankon de kutimo rilate al ceteraj stiloj el la mondo. Faciligu la konkludon, ke afrikanoj, amerikanoj neeŭropdevenaj, azianoj kaj oceanianoj neeŭropdevenaj, aŭ ne havas literaturan guston aŭ ili ne produktis Esperante. Ĉu veras ĉu ne veras, ne gravas. Ĝi sufiĉas por ekzisto; estas mi esperantisto.

6. Daŭre rimarkigu ĉiujn pri la aziaj problemoj bone paroli Esperanton

Ni scias, ke francoj ne bone prononcas la literon r; ke ankaŭ britoj havas problemojn pri la r kaj emas detrui la o-finaĵon; ke hispanoj miksas v kaj b; ke la plejmulto el la eŭropanoj suferas prononci la ĥ; kaj longa tiel plu. Sed tion ne menci. Pli bone daŭre substreku, ke mirindas la problemoj de ĉinoj rilate al la divido de r kaj l, aŭ ke japanoj ne kapablas bone prononci la vorton vortrezoro, tiom facila por hungaroj.

7. Laŭdu okcidentanojn

Rekte kaj nerekte per laŭdoj montru, ke la plej bonaj kaj mirindaj esperantistoj okcidentas. Ekzemple, laŭdu la rapidecon de John Smith, Ana Mateos, Ernest Mautthansen aŭ Pierre Lorene lernante Esperanton, sen mencii la proksimecon al Esperanto de la angla, hispana, germana aŭ franca relative al aliaj lingvoj, kiel la amerikaj. Fari tion faciligos la senton de stulteco en aŭskultantoj aŭ legantoj, kiuj ne regas eŭropajn lingvojn. Ankaŭ la premioj gravas. Kiam alvenas la momento elekti esperantistojn por publika laŭdo, klopodu ekzemple eviti la elekton de afrikanoj, kies atingoj ŝajnu ne selektindaj.

8. Plenigu la Esperantajn strukturojn per okcidentanoj

Kiam alvenas la vico elekti membrojn por la Akademio de Esperanto, la registraro de UEA aŭ de aliaj universalaj institucioj de la movado, lasu vin komforte emi proponi okcidentajn nomojn, ĉefe estu angloparolantoj. Ni ĉiuj scias, ke neniu loko tiom gravas kiel Britio kaj Usono. Do ni plenigu la strukturon per ili. Same faru rilate al la elekteblaj lokoj por la renkontiĝoj, kunvenoj, kongresoj kaj aliaj eventoj. Ankaŭ same faru rilate al la manifestoj kaj deklarioj, kiuj nepre havu nomon de eŭropaj urboj. Kaj ankaŭ pri la manlibroj pri instruado de la lingvo, metodoj instrui, stiloj ekzameni ktp. Ne rifuzu iun ajn oportunon.

Kompreneble tiaj kondutoj ne sufiĉos por la maluniversaligo de Esperanto. Multaj gravuloj kerne okupiĝadis antaŭe kaj sindedicas hodiaŭ sen fini la taskon. Ĉar esperantistoj estas ĉie, aktivaj, kreativemaj kaj Esperantamemaj, Esperantujo bone paŝas laŭ la celo maluniversaligi, sed malrapide. Ni bezonos jarojn. Do ne ripozu. Ni estu diligentaj. Memoru, ke guto malgranda konstante frapanta traboros la universalecon granitan, kiu ankoraŭ restas en la interna ideo.

EL ESPERANTO ES ÚTIL: UNA EXPERIENCIA PERSONAL

Me apunté al curso de esperanto organizado por la Asociación Catalana de Esperanto en enero de 2012. En ese momento estaba en paro y pensé que podía ser interesante. El profesor era Rubén Fernández y las clases se daban en el CIEMEN. Lo cierto es que no estudiaba demasiado, pero intentaba no perderme las clases presenciales. Seguí regularmente el curso hasta verano. A partir de entonces empecé a ir a encuentros esperantistas, tanto nacionales como internacionales, unos dos cada año. También iba leyendo libros y artículos de vez en cuando. En verano de 2013 participé en la escuela de verano que se celebra anualmente en Eslovaquia (Somera Esperanto-Studado, SES). En 2014 en Ronda (en el Congreso Español de Esperanto) me examiné para obtener el certificado B2 que otorga la Universidad de Budapest, según el marco común de referencia de la Unión Europea. En 2016 fui al congreso mundial en Nitra, Eslovaquia. Allí me enteré de que era posible examinarse del C1. No lo había preparado específicamente, pero me animé y decidí intentarlo. ¡Aprobé! Al cabo de unos meses me llegó el diploma oficial de la Universidad de Budapest. Y una última anécdota: en 2019 fui yo quien formó parte del equipo organizador del congreso anual de la Sennacieca Asocio Tutmonda (Asociación Mundial Anacional) que tuvo lugar en Barcelona.

Es decir, en poco tiempo logré una competencia en la lengua que me ha permitido incluso organizar un congreso, cosa que no me atrevería a realizar en otras lenguas a las que he dedicado más años y esfuerzos. En realidad, el tiempo de estudio serio del esperanto fue de seis meses. Después, de forma intermitente he ido practicando la lengua en los diferentes encuentros y también con algunas lecturas. El caso es que tengo un diploma C1 perfectamente válido y oficial, al igual que me ocurre, por ejemplo, con el inglés.

Todo esto quería explicarlo porque, visto con perspectiva, me doy cuenta de que estudiar esperanto fue una decisión muy acertada.

Después de casi 10 años que no salían, el año pasado la Generalitat de Catalunya convocó oposiciones para acceder al cuerpo docente de educación secundaria. Yo había trabajado 6 años en la escuela privada y decidí apuntarme por mi especialidad: Latín. Poco a poco fui superando las diferentes fases de la oposición y finalmente me presenté a la fase de concurso. Esta última fase consiste en presentar los méritos personales, que cuentan el 40% de la puntuación final. Entre ellos, mi certificado C1 de Esperanto, por el que me dieron 0,75 puntos.

Para que os hagáis una idea de la importancia de estas décimas, pensad que cada año de experiencia laboral como docente en la escuela privada cuenta 0,15 puntos. Cada curso



Cada tutoría de prácticas de estudiantes universitarios cuenta 0,1 puntos. El certificado de nivel superior de catalán C2 cuenta 0,2 puntos. Cada certificado de lengua extranjera de nivel B2 cuenta 0,5 puntos. Ser técnico superior de formación profesional cuenta 0,2 puntos. Un doctorado cuenta 1 punto. Una segunda titulación universitaria de 3 años (diplomatura) cuenta 1 punto y una segunda licenciatura cuenta 2 puntos.

Como explicaba antes, en mi caso tenía, entre otras, cosas dos diplomas de lengua C2: inglés y esperanto. Ahora bien, por algún motivo, sólo me dieron 0,75 puntos, en vez de los 1,5 puntos que me correspondían en esta categoría. Así que realicé la siguiente reclamación, que reproduzco aquí por si puede ser de utilidad a alguien.

Saioa Escobar, con DNI ***

Aspirante al cuerpo de Profesores de enseñanza secundaria ***

EXPONGO:

Que, habiendo superado la fase de oposición, he presentado en fecha *** de 2021 en la sede del tribunal ***, la documentación de alegación de méritos.

Que en relación con el punto 3.4.1. (Dominio de lenguas extranjeras: certificado nivel C1) de la hoja de autobaremo de méritos, he entregado dos certificados: *Certificate in Advanced English* de la Universidad de Cambridge y *Esperanto Language Examination Certificate* de la Universidad Eötvös Loránd de Budapest.

Que en la puntuación de la fase de concurso, para el punto 3.4.1 se han otorgado 0,75 puntos y, por tanto, sólo se ha valorado uno de los certificados.

Que el certificado de lengua inglesa presentado lo ha emitido Cambridge English Language Assessment, la institución de servicios lingüísticos vinculada a la Universidad de Cambridge y que certifica internacionalmente el conocimiento en esta lengua.

Que el certificado de lengua esperanto que se ha presentado lo ha emitido Origó Language Centre, la institución de servicios lingüísticos vinculada a la Universidad Eötvös Loránd de Budapest y que certifica internacionalmente el conocimiento en esta lengua.

Que, por tanto, mis conocimientos de la lengua inglesa y de la lengua esperanto han sido certificados, siguiendo el Marco Común Europeo de Referencia, con un nivel C1, por dos instituciones oficiales.

SOLICITO:

Que se me otorguen los 1,5 puntos correspondientes al apartado 3.4.1 de la hoja de autobaremo de méritos.

Que, en caso de no ser aceptada la presente alegación, me sea comunicado en virtud de qué artículo de la normativa aplicable queda excluido de la puntuación uno de los certificados de conocimientos de lenguas extranjeras aportados.

Cuando llegó el momento, el tribunal consideró que al valorar el apartado 3.4.1 se había equivocado y que en realidad me correspondían 1,5 puntos. No podía ser de otra forma, porque mis dos certificados eran oficiales y, por tanto, válidos.

En resumen, el conocimiento del esperanto, además de proporcionarme una mirada más amplia y una conciencia más cívica, también me ha servido para mi vida profesional.

Saioa Escobar.

¹ Una versión previa de este texto apareció en catalán en el número 369 (135) de junio/julio 2021 de *Kataluna Esperantisto*.

² El Centro Internacional Escarré para las Minorías Étnicas y Nacionales (CIEMEN) es una ONG que promueve el conocimiento y reconocimiento de las minorías étnicas y nacionales en todo el mundo.

Iom da matematiko (5) ...

Palindromoj numeraj



La vorto “palindromo” (de la greka “pálin” (denove, retroe) kaj “drómos” (kurado, vojo)) oni aplikas en Esperanto al tiuj numeroj, vortoj aŭ frazoj, kiujn oni same literumas de maldekstre dekstren kaj de dekstre maldekstren. Ekz., la numero 30503, la vortoj “igi” kaj “jaraj” aŭ la PIV-a frazo “saĝa nomo naĝas”.

En la hispana oni distingas numerojn disde vortoj kaj frazoj. Por la unuaj ekzistas la vorto “capicúa” (pr. “kapikúa”), el la kataluna “cap” (“kapo”) kaj “cua” (“vosto”). Ni okupiĝos pri tiuj numeraj palindromoj; pri la aliaj jam okupiĝis Lorenzo Noguero en “Boletín” (nro. 431. jul/sep 2020. p. 25/27).

En Esperanto oni ne distingas numerajn disde nenumeraj palindromoj. Ekz., en la “Granda vortaro hispana-Eo” de Fernando de Diego, ni trovas la vorton capicúa = palindromo, palindroma numero.

Nu, ni iru al tiuj numeraj palindromoj. Ĉu vi pensas ke ili multas, ĉu ke ili malmultas? Kalkuli ilian nombron estas relative facila tasko.

Ni komencu per la 1-ciferaj numeroj. Ili estas 10: 0,1,2,3,4,5,6,7,8,9 kaj, evidente, ĉiu el ili estas palindromo.

2-ciferaj palindromoj: ili ĉiuj devas havi la formon “aa”, kie “a” povas varii de 1 ĝis 9. Sekve, estas 9:

11,22,33,44,55,66,77,88,99

3-ciferaj numeroj: ili devas havi la formon “aba”, kie “a” povas varii de 1 ĝis 9 kaj “b” de 0 ĝis 9. Sekve, estos entute $9 \times 10 = \underline{90}$. Ili estas:

101 202 303909
111 212 313919
121 222 323929
131 232 333939
.....
.....
191 292 393999

02-02-2020

Aliaj palindromaj datoj:
9-10-2019
12-02-2021
22-02-2022

4-ciferaj palindromoj: Ili devas havi la formon “abba”, kie “a” povas variii de 1 ĝis 9 kaj “b” de 0 ĝis 9. Pro tio, la nombro de 4-ciferaj palindromoj estas la sama ol antaŭe $9 \times 10 = 90$.

100120023003 9009
 111121123113 9119
 122122223223 9229
 133123323333 9339

 199129923993 9999

- 5-ciferaj palindromoj: Ili devas havi la formon “abcba”, kie “a” povas variii de 1 ĝis 9, “b” de 0 ĝis 9 kaj “c” de 0 ĝis 9. Sekve, estas entute $9 \times 10 \times 10 = 900$ 5-ciferaj palindromoj.

La unuaj estas 10001, 10101, 10201, 10301,

11011, 11111, 11211, 11311,

.....

Kaj la lastaj, 99099, 99199, 99299, 99399, 99999

Post tiom da numeroj kaj kalkuloj, eble vi jam sentas iom da kapturigo. Sed antaŭ ol vi definitive sveniĝos, ni respondu la komencan demandon: ĉu la numeraj palindromoj estas abundaj?

- Inter la unuaj 100 numeroj estas 10 1-ciferaj kaj 9 2-ciferaj. Entute, 19. Tio estas 19%.
- Inter la unuaj 1000 numeroj estas la antaŭaj 19 plus 90 3-ciferaj. Entute, 109. Tio estas $109/1000 \approx 11\%$.
- Inter la unuaj 10000 numeroj estas la antaŭaj 109 plus 90 4-ciferaj. Entute, 199. Tio estas $199/10000 \approx 2\%$.
- Inter la unuaj 100000 numeroj estas la antaŭaj 199 plus 900 5-ciferaj. Entute, 1099. Tio estas $1099/100000 \approx 1\%$.

Do, ju pli da ciferoj ni deziras por niaj palindromoj, des pli ili iĝas malabundaj. Pro tio, kolektantoj de tiuj numeroj en biletoj diversaj aŭ en aliaj aĵoj troviĝas antaŭ titana entrepreno.

Jesús M. García Iturrioz
jmgiaa@hotmail.com

**Personaj informoj**

BONVOLU SKRIBI MAJUSKLE.

| | | | |
|---------------------|---------------------------------|-------------------|--|
| Persona nomo: | | Nur por renovigoj | |
| Familia(j) nomo(j): | | Membra numero: | |
| Poŝta adreso: | | Poŝtkodo: | |
| Urbo: | Provinco/Regiono/Lando: | | |
| Telefonnumero(j) | Identiga numero (DNI/Pasporto): | | |
| Retadreso: | Naskiĝdato: | | |

Membrokategorio

Marku per X la elektitan kategorion:

| Kategorioj | | Eŭroj | X |
|------------|--|-------|---|
| OM | Individua membro, ordinara kotizo | 32 | |
| RM | Individua membro, senpapera kotizo: ricevas la bultenon nur en elektronika formo * | 30 | |
| SM | Rabatita kotizo: senlaboruloj aŭ specialaj kondiĉoj ** | 20 | |
| JM | Rabatita kotizo: junuloj (< 30 jaroj) *** | 20/10 | |
| PM | Protektanta membro | 64 | |
| KM | Kolektiva membro **** | 64 | |

(*) Speciala kotizo por anoj kiuj ne deziras ricevi la bultenon en papera formo kaj preferas ricevi ĉiujn komunikojn nur per elektronikaj rimedoj.

(**) Speciala kotizo por senlaboruloj aŭ aliaj personoj kun ekonomiaj malfacilaĵoj; intertraktu kun la estraro de HEF por diskuti la detalojn.

(***) La anoj malpli ol 30-jaraĝaj estas aŭtomate membroj de la junulara sekcio HEJS. Se ili estas krome membroj de klubo aŭ asocio kolektiva membro de la Federacio, ili pagas duonon de la rabatita kotizo.

(****) Ne devas pagi kotizon la kolektivaj membroj kun malpli ol 10 anoj, du el kiuj estas individuaj membroj de HEF.

Ĉiuj membroj ricevas la asocian bultenon ("Boletín"), 4 numerojn jare. Membroj kun rabatitaj kotizoj ricevas la bultenon nur en elektronika versio.

Pagmaniero:

- Pagado rekta per banko (kompletigu la malsupran formularon; en la hispana).
- Pago per la bankokontoj de HEF (havigu atestilon).
 - TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926 4025
 - BBVA: ES85 0182 1252 3102 0401 1961
- Pago per la konto hefb-m de Universala Esperanto-Asocio (havigu atestilon).
- Pago per Paypal, ĉe la konto admin@esperanto.es.
- Pago kontanta en la asocia oficejo.

Dato:

Subskribo:

LEĜA INFORMO / NOTA LEGAL:

Laŭ la eŭropa Leĝo pri datumprotektado (Reglamento EU 2016/679, por protekto rilate al uzo de privataj datumoj), Hispana Esperanto-Federacio informas vin ke viaj datumoj estos aldonitaj al bita datumbazo, propra de HEF, kiun nia asocio utiligos nur por internaj celoj aŭ kun rilato al Esperanto. Per la subskribo de tiu ĉi dokumento, vi permesas tiun ĉi utiligadon. HEF ne donos viajn datumojn al eksteraj organizaĵoj, krom pro leĝaj kialoj. Vi povas aliri la informojn, kaj modifi aŭ forigi ilin, per mesaĝo al FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO, Ref.: DATOS, C/ Rodríguez San Pedro, 13, 3º - 7, 28015 Madrid, aŭ al retadreso admin@esperanto.es.

En virtud de lo dispuesto en el Reglamento (UE) 2016/679 del Parlamento europeo y del consejo de 27 de abril de 2016, relativo a la protección de las personas físicas en lo que respecta al tratamiento de datos personales, la FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO le informa de que sus datos personales incorporados en este formulario serán incluidos en un fichero creado bajo nuestra responsabilidad, cuyo uso es exclusivamente para gestiones internas propias de la FEE, así como para el envío de publicaciones e informaciones relacionadas con el esperanto. Con la firma de este documento, consiente expresamente este uso de sus datos. Le informamos además, que la FEE no cederá estos datos a terceros salvo lo que marque la ley en materia de información a las Administraciones Públicas, y que puede ejercer sus derechos de acceso, rectificación, cancelación y/u oposición, previstos en la citada normativa, dirigiendo un escrito a FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO, Ref.: DATOS, C/ Rodríguez San Pedro, 13, 3º - 7, 28015 Madrid, o al correo electrónico admin@esperanto.es.

DOMICILIACIÓN BANCARIA

| | |
|-----------------------------------|------------|
| Titular de la cuenta: | |
| Banco o caja: | |
| Dirección de la oficina bancaria: | |
| Código postal: | Localidad: |
| IBAN: | |
| prefijo | entidad |
| sucursal | D.C. |
| cuenta | |

Fecha:

Firma del titular: